„Mutig vorwärts!“ „Kuraĝe antaŭen!“

Aŭstria Esperantisto
(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Aŭstria Esperanto-Delegitaro kaj Esperanto-Delegitaro de Wien.

3a jaro. No. 12 Monata Decembro 1926

Redaktejo kaj administrejo: Korneuburg ĉe Wien, Postfach.

Konto ĉe poŝtŝparkaso aŭstria n-ro D-123.826.

Jarabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ. S 4.30, germanlandanoj RM 3.—, alilandanoj sv. fr. 4.—; ponumere: por enlandanoj 40 aŭ. g., eksterl. 50 aŭ. g.

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug.

Aus aller Welt.

Die staatlichen Esperantoprüfungen im Herbst 1926.

(Bericht leider verspätet eingelangt.)

Zum drittenmale fand die Staatsprüfung vom 8.—10. November im Gebäude der Bundes-Lehrerinnen-Bildungsanstalt, Wien, I., Hegelg. 14, statt. Erschienen waren 17 Prüflinge, 13 für die Lehrbefähigungs-, 4 für die Kenntnisprüfung. Davon waren 16 Inländer (13 aus Wien) und 1 Ausländer (Jugoslawe). Die Prüfung bestanden 16, davon 4 mit Auszeichnung, 1 trat während der Prüfung zurück.

Radio Königswusterhausen, Welle 1300.

Jeden Samstag 15·30—16 h Esperantokurs am Großsender im Pädagogischen Rundfunk; Postrat Behrendt mit Lehrerin Marta Moelke als „Schülerin“. Beobachtungen, Wünsche und Kritik von Nichtesperantisten und Lehrern erbeten an „Deutsche Welle, Berlin, W 9“. Zweiter und dritter Kurs werden folgen.

Esperanto und die Polizei.

Man weiß, daß es in Barcelona, Berlin, Breslau, Budapest, Chemnitz, Dresden, Leipzig, Lissabon, Madrid, Montevideo, Prag, Rio de Janeiro und Wien, Graz, Linz, Wels und in vielen anderen Orten schon Polizeibeamte gibt, die Esperanto beherrschen und daß sie durch ein besonderes Abzeichen auf dem Waffenrock als Esperanto-Dolmetscher gekennzeichnet sind. Das Preußische Ministerium des Innern hat eine Rundfrage (12. Dezember 1925 — II M 2935/II) in Bezug auf die Polizeibeamten angestellt, die eine fremde Nationalsprache oder Esperanto sprechen, zu dem Zweck, sie in gleicher Weise zu kennzeichnen.

Maschinschreibewettbewerb in Esperanto.

In dem Wettbewerb am 23. Mai d. J., veranstaltet von der Pariser internationalen Messe, war die erste der zehn Prämiierten Frl. Odette Piau vom internat. Arbeitsamt in Genf.

Radio und Esperanto.

Eine einstimmig angenommene Entschließung des Kongresses der tschechischen Radio-Amateure in Brünn (30. Mai 1926) zeigt das immer mehr wachsende Interesse für Esperanto in den Kreisen der Radiofreunde. Der Wortlaut der Entschließung ist folgender:

Im Hinblick auf die Entschließung des 1. Kongresses der Internationalen Union der Radio-Amateure in Paris vom 16. April 1925 und auf die Schwierigkeiten, die sich in den internationalen Beziehungen aus der Verschiedenheit der Sprachen ergeben, haben wir beschlossen, allen tschechischen Radio-Amateuren den Gebrauch des Esperanto, als der die gegenseitige Verständigung erleichternden Hilfssprache, zu empfehlen, und zwar für Radio-Sendungen, als auch für die Wiedergabe von Zeitungsaufsätzen und Kongreßreden. Die gleiche Empfehlung wird ausgesprochen für den radiotelegraphischen Verkehr in all den Fällen, in denen die Korrespondenten nicht in der Lage sind, sich mit Hilfe einer Nationalsprache zu verständigen.

Eine ähnliche Entschließung wurde angenommen von dem 1. Allsowjetländischen Kongresse der Gesellschaft der Radiofreunde in Moskau, die empfiehlt, daß die Esperantolehrgänge und die E.-Vorträge, welche die Hauptstationen senden, systematisch organisiert werden möchten. Die Entschließung enthält auch eine Empfehlung an die Radio-Zeitungen, eine Seite für den Esperanto-Unterricht oder den Gebrauch des Esperanto bereit zu stellen.

Die Post und Esperanto.

Der Kommissär der Post-, Telephon- und Telegraphen-Verwaltung der Sowjet-Union hat mit einer Sonderverfügung vom 17. Juni 1926 (Nr. 6/304) Esperanto als „offene Sprache“ für Telegramme in Rußland zugelassen.

Es sei bei dieser Gelegenheit nochmals daran erinnert, daß vom 1. November 1926 Esperanto amtlich als „offene Sprache“ im internationalen Telegraphenverkehr allgemein zugelassen ist.

„Radio—Wien"

De la kursgvidanto Walter Smital.

„Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj; ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝelojn; ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj; sed ni kredas, ke komunikiĝado kaj konatiĝado sur neŭtrala fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de tiuj bestaĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona volo, sed simple de sinnekonado kaj de devigata sinaltrudado." (Kongresparolado, en Genève, 28. VIII. 1906, IIa U. K. de E.)

„... kulpigo, kiun ni ofte devas aŭdi, estas tio, ke ni Esperantistoj estas malbonaj patriotoj. Ĉar tiuj Esperantistoj, kiuj traktas la Esperantismon kiel ideon, predikas reciprokan justecon kaj fratecon inter la popoloj, kaj ĉar laŭ la opinio de la gentaj ŝovinistoj, patriotismo konsistas el malamo kontraŭ ĉio, kio ne estas nia, tial ni laŭ ilia opinio estas malbonaj patriotoj, kaj ili diras, ke la Esperantistoj ne amas sian patrujon. Kontraŭ tiu ĉi mensoga, malnobla kaj kalumnia kulpigo ni protestas plej energie, ni protestas per ĉiuj fibroj de nia koro! Dum la pseŭdopatriotismo, t. e. la genta ŝovinismo, estas parto de tiu komuna malamo, kiu ĉion en la mondo detruas, la vera patriotismo estas parto de tiu granda tutmonda amo, kiu ĉion konstruas, konservas kaj feliĉigas. La Esperantismo, kiu predikas amon, kaj la patriotismo, kiu ankaŭ predikas amon, neniam povas esti malamikaj inter si.

... kiam pri amo al la patrujo parolas al ni la ŝovinistoj, tiuj reprezentantoj de abomeninda malamo, tiuj mallumaj demonoj, kiuj ne sole inter la landoj, sed ankaŭ en sia propra patrujo konstante instigas homon kontraŭ homo — tiam ni kun la plej granda indigno nin deturnas. Vi, nigraj semantoj de malpaco, parolu nur pri malamo al ĉio, kio ne estas via, parolu pri egoismo, sed neniam uzu la vorton „amo"; ĉar en via buŝo la sankta vorto „amo" malpuriĝas!" (Parolado en Guildhall, London, 1907.)

(Daŭrigota.)

„Wir sind nicht so einfältig, wie manche Leute von uns denken; wir glauben nicht, daß eine neutrale Grundlage aus den Menschen Engel machen wird; wir wissen sehr gut, daß die schlechten Menschen auch nachher schlecht(e) bleiben werden; aber wir glauben, daß Verkehr und Bekanntwerden auf neutraler Grundlage wenigstens die große Menge jener tierischen Handlungen und Verbrechen beseitigen wird, die nicht von schlechtem Willen, sondern einfach von gegenseitiger Unkenntnis und erzwungener Aufdrängung verursacht werden." (K.-Rede in Genf, II. E.-Welt-Kongreß.)

„... eine Beschuldigung, die wir oft hören müssen, ist das, daß wir Esperantisten schlechte Patrioten sind. Weil jene Esperantisten, die den Esperantismus als Idee behandeln, gegenseitige Gerechtigkeit und Brüderlichkeit zwischen den Völkern predigen, und weil nach der Meinung der Stammeschauvinisten Vaterlandsliebe aus Haß gegen alles besteht, was nicht unser ist, deshalb sind wir nach ihrer Meinung schlechte Patrioten und sie sagen, daß die Esperantisten ihr Vaterland nicht lieben. Gegen diese lügenhafte, gemeine und verleumderische Beschuldigung erheben wir schärfsten Einspruch, Einspruch mit allen Fasern unseres Herzens! Während der Pseudopatriotismus, d. i. der Stammeschauvinismus, ein Teil jenes gemeinsamen Hasses ist, der alles in der Welt zerstört, ist die wahre Vaterlandsliebe ein Teil jener großen Weltliebe, die alles aufbaut, erhält und beglückt. Das Esperantotum, welches Liebe predigt, und die Vaterlandsliebe, die auch Liebe predigt, können einander niemals Feind sein.

... wenn von Liebe zum Vaterlande zu uns die Chauvinisten sprechen, diese Vertreter abscheulichen Hasses, jene finsteren Dämonen, die nicht allein zwischen den Ländern, sondern auch in ihrem eigenen Vaterlande ständig Menschen gegen Menschen hetzen, — dann wenden wir uns mit größter Empörung ab. Ihr, schwarze Saatstreuer des Unfriedens, sprechet nur von Haß gegen alles, was nicht euer ist, sprechet von Selbstsucht, aber verwendet nie das Wort „Liebe"; denn in eurem Munde wird das heilige Wort „Liebe" besudelt!" (Rede in der Guildhall, London, 21. VIII. 1907, nach dem III. E. W.-K. in Cambridge.)

(Wird fortgesetzt.)

Vintrosportejoj en Aŭstrio.

Ministerialrat d-ro Dorninger, direktoro de „Österr. Verkehrswerbungs-Ges."

Preskaŭ ĉiuj landoj en Eŭropo havas pli malpli grandan nombron da pli malpli bonaj vintrosportejoj. Kvankam same koncerne nombron, kiel ankaŭ kvaliton de sportejoj Aŭstrio staras en prominenta loko, tamen la plej alta valoro de ĉi tiu lando de vintra sporto havas ankaŭ alian kaŭzon.

Same kiel Aŭstrio prezentas la plej diversajn pejzaĝbildojn, same kiel laŭ plej formoriĉa varieco alnajbariĝas altmontaro kaj ebenaĵo, same apenaŭ egalas unu vintrosportejo al la alia, aŭ pli ĝuste dirite, ili ĉiuj kune formas unu solan grandan vintrosportan paradizon. Ĉi tiu loka alkonformiĝo esprimiĝas ankaŭ rilate al tempo, tiel ke Aŭstrio prezentas de komenco de decembro ĝis preskaŭ fino de majo iuloke la plej bonan okazon por vintrosportado.

Okcidente kuŝas la plej alta vintrosporta paradizo de Aŭstrio, la monto Arlberg, kies famo estas en la mondo reprezentata per nomoj k. e. St. Anton, St. Christof, Stuben kaj Zürs. La ĉefurbo de Tirolio, la konata malnova Innsbruck, estas kun sia ĉirkaŭaĵo unu el la plej grandaj vintrosportejoj de Aŭstrio. Pli okcidente estas per siaj mondfamo konataj lokoj, nome Kitzbühel, okcidentlime de Tirolio, kaj Mitterndorf (mezvilaĝo), kies nomo jam diras ke ĝi estas meze de la skilando de Aussee. La progresanta vintro logas la skikurantojn ĝis sur la terenon de la federacia ĉefurbo Wien. Survoje tien faras la tabuloj multajn postsignojn kaj multaj grandiozaj malsupren-veturadoj restas en la memoro de skikurantoj, ligataj al la nomoj de ambaŭ Gastein, de Admont kaj Mariazell, eĉ al Wienerwald (viena arbaro). Laŭlonge de la suda fervojo viciĝas la lokoj de la Semmering-regiono, poste Mürzzuschlag, Murau, kvazaŭ longa ĉeno de vintraj plezuroj.



Antaŭ la ekveturo.

La malnova kutimo kaj bezono meti dumvintre la veturilojn sur glitrelojn ĉiam ankoraŭ ekzistas en la alpolandoj kaj dum monatoj anoncas gaja sonoriletado la proksimiĝon de veturilo. Rodlovojoj estas la plej malnovaj instaloj de ĉiu vintrosportejo, kies grandaj fratoj, la bobvojoj nur poste aliĝis. La stratetveturado (Gasselfahren) fariĝis ree moderna kaj laŭ sia plej nova speco, la skikjöring, ĝi okupas vastan spacon en la programo de vintraj aranĝoj.

Ankaŭ la glacisporto ĝuas en Aŭstrio grandan ŝatadon. Estas kvazaŭ malofteĵo por urbo de milionoj da loĝantoj, kiel Wien, ke sur ĉi tiu teritorio ĝi ludas gvidantan rolon. La plej grandaj

sportejoj estas la karintiaj lagoj, kie ankaŭ la surglacia velveturado trovas la necesan amplekson. Inter la urbaj surglaciaj ludoj estas nominda la hockey kaj surlande la glacipafado, kiu anstataŭas la someran kegloludon. Estas do nur konvena aprobo, se Aŭstrio gastigas dumvintre grandan nombron de sportemaj eksterlandanoj kaj inter ĝiaj limoj okazas multaj internaciaj konkuroj.

Sur skioj en Wienerwald.



Trad. Oskar Sinner-Wien.

Represo en E.- kaj naciaj gazetoj permezata. Ni disponigas ankaŭ diversajn kliŝojn.

Feliĉigan novjaron

deziras al ĉiuj legantoj, kunlaborantoj kaj subtenemaj amikoj de „A. E.“

la redakcio.

La reĝino de la virtoj.

De Christine Siedl-Wien.

En la ĉielo iam okazis diskuto pri la rangeco de la virtoj. Multspecaj opinioj interbatalis, sed neniu sukcesis venki. Tamen celante finrezulton la ĉielanoj interkonsentis, peti tiun de la Sinjoro mem.

Aŭskultinte ilian deziron la Sinjoro parolis: „Kiam mi sendis la virtojn al la tero, ili valoris egalrangaj. Sed mi volas esplori, kiel ili plenumis mian ordonon, disvastiĝi inter la homoj. ‚Reĝino de la virtoj‘ mi volas nomi tiun, kiu okupis la plej multajn lokojn. Tuj mi forsendos observontan anĝelon; laŭ lia diro okazu la decido.“

La reveno de la anĝelo okazigis solenan kunvenon de la ĉielanoj antaŭ la dia trono, kaj la sendito raportis jene: „Alveninte sur la tero mi troviĝis en granda, brua urbo. Sed ne ĝojigaj estis la unuaj impresoj. Atakitaj, batalantaj kaj eĉ parte venkitaj, nur izole vivantaj mi vidis la virtojn Moraleco, Modesteco, Konfido, Honesteco, Toleremo, Obeemo. Tamen mi vidis ankaŭ virtojn regantajn: Bonfaremo, Pacienco kaj Dankemo regas en hospitaloj kaj rifuĝejoj, Pieco, Humileco, Silentemo, Mildeco en la domoj de monaĥoj kaj monaĥinoj. Forlasinte la grandurbon mi trovis en pacaj vilaĝoj kaj en izole situaj kampodomoj la virtojn Laboremo, Sincereco, Gastigemo. Poste mi enpaŝis terurajn regionojn — la regnon de furiozanta milito. Funebre ektremis mia koro pro la amaso da malfeliĉego, mizero kaj malespero, kiu min ĉirkaŭis. Jen, kia surprizo! Meze inter la terurâjoj mi ekvidis multnombran virtaron. Mi memoras la nomojn Braveco, Sinoferemo, Fideleco, Helpemo, Kompato, Pardonemo.

Sed nun aŭskultu la nomon de tiu virto, kiu meritas la glorkronon. Ĉu en bruaj urboj aŭ en trankvilaj vilaĝetoj, ĉu en pacaj landoj aŭ en regnoj turmentitaj de la milito, ĉie kaj plej ofte mi renkontis la virton Senkulpeco; ĉar ĝi rigardis min el ĉiu infanokulo.“

Eksperimento Bovet.

Kion vi faris por subteni la eksperimenton de prof. Bovet?

Interrilatu pri ĝi tuj prof. P. Bovet, Institut J. J. Rousseau, 4, rue Chas. Bonnet, Genève (Svislando).

La surprizo.

De Ellersiek-Berlin.

Nolte estis juvelisto.
Li posedis magazenon,
grandan, bone instalitan,
en Berlin, en ĉefa strato.

Iun tagon, post tagmezo,
kiam aĉetantoj venas
nur malofte en vendejon,
lin vizitis du sinjoroj.
Unu laŭ aspekto estis
„la sinjoro“, ege nobla,
la alia la servisto.
La nobelo, kiu havis
dekstran brakon en bandaĝo,
petis, ke la juvelisto
montru al li koloĉenojn.
Komplezeme Nolte servis
al la distingita viro,
kaj al tiu fine plaĉis
unu el la sortimento.
„Kiom kostas“, li demandis,
„Tiu koloĉen' el perloj?“
„Ok mil markojn, via moŝto!“

La klient' ektimis iom.
„Ho, sinjoro, tio estas
multekosta; tiom povas
ne elspezi mi. Mi petas,
malaltigu do la prezon.“

Kaj kun Nolte li komencis
pri la koloĉen' marĉandi.
Fine ili akordiĝis,
ke ĝi kostu sep mil markojn.

Kiam la kliento estis
nun pagonta tiun sumon,
li konfesis, ke li havas
ne sufiĉe plu da mono
en la poŝo. Petrigarde
li sin turnis do al Nolte:

„Jen, vi vidas, ke mi portas
brakon mian en bandaĝo,
kio min malhelpas skribi.
Mi intencas, la serviston
sendi al edzino mia,
por de ŝi venigi monon.
Sekve petas mi, bonvolu
por mi skribi la leteron.“

„Tre volonte“, Nolte diris,
„Diktu la skribotan tekston!“

La nobelo al li diktis:
„Karulino mia, donu
al servisto sep mil markojn.
Temas pri surprizo bela,
kiun mi al vi havigos.
Korsaluton! Via Karlo!“

Nolte skribis. Ĉe la fino
li ekhaltis. „Vi nomiĝas
ankaŭ Karlo? Ni ja estas
samnomuloj!“ — „Evidente!“
La klient' ĝentile diris.

Kiam la servist' revenis
li alportis monbiletojn
sumiĝantajn sep mil markojn.
Kontraŭ ili la kliento
tuj ricevis la kolĉenon.
Kaj dirante: „Ĝis revido!“
Li kun la servist' foriris. —
Post la fermo de l' vendejo
Nolte en vespero iris
gaje kaj kontente hejmen.
En la hejmo lin akceptis
la edzino, ne estante
malpli gaja ol la edzo.
„Mia kara“, ŝi tuj diris,
salutinte lin, „nun montru
la surprizon promesitan!“
„Ĉu surprizo? Mi ne scias!“
„Nu, vi mem hodiaŭ sendis
skribitaĵon per servisto,
postulante sep mil markojn,
kiujn vi, laŭ via diro,
por surprizi min bezonis.“ —
Nolte preskaŭ svenis, kiam
li komprenis nun la ruzon,
kiun lia „samnomulo“
uzis por la friponaĵo.
Ekscitite li tuj kuris
al la policejo. Tamen:
la „nobelon“ kaj la ĉenon
li ankoraŭ nun atendas.

Internaciaj Kongresoj.

Ne agu en ili, ne petinte ekzempleron de „Konsilaro pri la agado ĉe internaciaj kongresoj“, eldonita de Intern. Centra Komitato de l. Esp.-movado, 12, Bd. du Théâtre, Genève.

VOLKSZÄHLUNG!

Jede Woche bringt, wie Sie aus unseren Berichten teilweise ersehen, dem Esperanto neue Erfolge bei Behörden, internationalen Organisationen und ähnlichen.

Mit weitaus geringerem Aufwande an Werbekräften werden wir die allgemeine Einführung erreichen, wenn die eben eingeleitete Zählung der Gesamtesperantistenschaft abgeschlossen sein wird.

Unsere **Zentrale in Genf** ruft im Einvernehmen mit den Fachvereinigungen und dem Weltbunde der proletarischen Esperantisten zur Erfüllung dieser für den Einzelnen einfachen Pflicht, deren Erfüllung für die Gesamtheit doch von außerordentlicher Bedeutung ist.

Beantworten Sie daher ohne Ausnahme **zuverläßlich** bis Ende Dezember (**dieses** Jahres) folgende Fragen:

1. Voller Name und genaue Anschrift;
2. Zugehörigkeit (Gruppe. Weltverbände..);
3. Anzahl der Gruppenmitglieder Ende 1926;
4. Wieviel Kurse heuer und insgesamt?
5. Wieviel Bücher in der Bücherei, gekauft, verkauft, herausgegeben?
6. **Welche anderen Gruppen und Einzelesperantisten kennen Sie?** (Wie 1. und 2., zwecks Kontrolle!)

Um den mit dieser weltumspannenden Arbeit überhäuften Leiter der statistischen Abteilung unserer Genfer Zentrale, Herrn Oberstudienrat Dr. Dietterle-Leipzig, Direktor des staatlichen E.-Institutes für das Deutsche Reich, zu entlasten, werden wir ihm das österreichische Material nach seinen Gesichtspunkten einheitlich zusammengefaßt einsenden.

Eine große, undankbare Arbeit, die wir aber gern übernehmen, damit Österreich in dieser Weltangelegenheit eine würdige Rolle spiele!

Wir verpflichten uns ehrenwörtlich, die einlaufenden Meldungen niemandem dritten im einzelnen mitzuteilen und die Kenntnis der Namen insbesondere nicht zu Werbezwecken oder Geldsammlungen zu gebrauchen! Es wagt also niemand etwas, wenn er sich meldet.

Fordern Sie wiederholt(!) alle Ihnen bekannten E.-Anhänger auf, ebenfalls ihre Pflicht zu erfüllen. Kostet nur guten Willen und eine Postmarke.

Für das „Österr. E.-Institut“:
W. Smital m. p.

Für das Organ „Aŭstria Esperantisto“:
H. Steiner m. p.

Anschrift: „Aŭstria Esperantisto“, Korneuburg bei Wien, Postfach.

XIX. Universala Kongreso de Esperanto, Danzig, 28. julio ĝis 4. aŭg. 1927.

Patrono: La prez. de l' senato de la libera urbo Danzig, d-ro Heinrich Sahm.
Prez. de L. K. K.: S-ro Bernh. Aeltermann.
Kotizo: 25 svis. fr. aŭ 20 Rm.
Oficiala organo: „Esperanto“-Ĝenevo.
Fakaj kunvenoj: Aranĝemuloj skribu tre baldaŭ al L. K. K.
Karavanoj: U. E. A. preparas kelkajn. Pro la malgranda nombro da hoteloj tie estas konsilinde, mendi jam nun kombinitan biletaron de U. E. A.

Ĉu vi prilaboradas vian lokan gazetaron? Eltranĉojn al ni!

IHR RECHT

auf den Weiterbezug der Zeitschrift endet mit dieser Nummer. Wir hoffen, daß Sie es

erneuern

werden. Erlagschein liegt bei. Mangels schriftlicher Abbestellung erfolgt weitere Zusendung. Rasche Einsendung von Schilling 4.30

spart uns Arbeit

und Ihnen die Unannehmlichkeit, gemahnt zu werden.

Die Schriftleitung.

Lingvaj babilaĵoj.

De F. Bock-Wien.

4. Ĉu oni povas „priskribi“ ion, ne skribante? Laŭ mia opinio, ne. Tamen lernantoj dum lecionoj estas ofte invitataj, priskribi bildon aŭ alian objekton, ne uzante plumon, nek krajonon aŭ kreton. Konforme al la instruo de paragrafo 3a skribi restas skribi kaj ne povas perdi sian sencon. Oni eble kontraŭdiros, ke priskribi estas tie ĉi metafore uzata kaj tiel internacie akceptita. Grava argumento sendube. Sed ĉu vi ankaŭ akceptus: „La ministro sendis delegiton al la konferenco kun ekzakte ĉirkaŭskribita (umschriebenen) programo“? Kredeble ne. Ne diru do „priskribu tiun-ĉi bildon“, se vi povas pli korekte diri „priparolu la bildon“. Kio reliefigas la veran sencon de priskribi, estas la prefikso „pri“: priskribi = skribi pri. Se anstataŭ „pri“ ni havus „de“ aŭ eĉ pli bone „di“: diskribi, la malklara aŭ sensignifa komenciĝo malheligus kaj kvazaŭ nevalidigus la sencon de skribi.

La laste nomita cirkonstanco instigas min fari pluan rimarkigon. Kial en Esperanto oni diras „ripeti“ kaj ne „repeti“ konforme al la germana „repetieren“, la franca „répéter“ aŭ la angla „repeat“? Evidente pro tio, ĉar „repeti“ eble naskus la ideon de „refoje peti“. Nun bone, sed ĉu simila pripenso ankaŭ kondukis al: ricevi, rifuĝi, rifuzi, rikolti, ripozi, riproĉi, riverenco? En tiuj ĉi vortoj re ja ne kaŭzus erar-komprenon. Aliflanke, en „reprezenti“: la prokuristo reprezentas la ĉefon, la komenciĝo „re“ tute ne taŭgas kaj devus esti anstataŭita de „ri“. Ankaŭ „rekoni“ estas malbona, se ĝi volas signifi „anerkennen“. Similan konfuzon oni rimarkas pri „de“ kaj „di“; komparu ekzemple: difini, diboĉi, deklari, delegi ktp.

(Daŭrigota.)

Sendu fabrikmarkojn kun Esperantonomoj!

PROPRAJ RAPORTOJ DE „A. E.“

Fine — la aŭstria poŝto.

Miaj vizitoj ĉe la ĝeneraldirektoro de „Aŭstria Poŝta kaj Telegrafa Administracio“, sekcia ĉefo d-ro Hoheisl, kaj ĉe la prezidanto de „Telegrafa Direkcio por Wien, Nieder-Österreich kaj Burgenland“, Hofrat inĝ. Ustrnul, sekvigis reskripton jenan:

T. D. Zl. 94 Vorst./1926

Wien, 20. Oktober 1926.

An alle Dienststellen.

Esperantokurs.

Der Herausgeber und Redakteur der österreichischen Esperanto-Zeitung, Oberinspektor i. R. der Bundesbahnen Steiner, hat sich erbötig gemacht, für unsere Bediensteten einen Kurs in der Welthilfssprache Esperanto abzuhalten.

Wir laden Sie ein, Ihre Bediensteten hievon sofort zu verständigen und uns jene Angestellten, die sich für diesen Esperantokurs melden, ungesäumt bekanntzugeben. Auch Leermeldungen sind zu erstatten.

Der Präsident: Ustrnul m. p.

Min atingis letero d. d. 17. XI. 1926:

An den Oberinspektor i. R.
Herrn Steiner
in Korneuburg (Postfach Nr. 26).

Auf Ihre Zuschrift vom 10. X. l. J. teilen wir Ihnen mit, daß sich bei uns 28 Bedienstete für den Esperantokurs gemeldet haben.

Wir ersuchen Sie um Mitteilung, wann der Kurs beginnen kann, damit wir die entsprechenden Vorkehrungen treffen können ...

Als Kurslokal würden wir Ihnen den Vortragssaal im Fernsprechvermittlungsamte, Wien, I., Neutorgasse 7, zur Verfügung stellen, wobei wir von der Einhebung eines Kostenbeitrages für Beleuchtung, Beheizung und Reinigung ausnahmsweise absehen ...

Schließlich teilen wir Ihnen über Ersuchen der Postdirektion für Wien, Niederösterreich und Burgenland mit, daß dortselbst 14 Anmeldungen für den Esperantokurs eingelangt sind. Die Postdirektion stellt keinen eigenen Esperantokurs auf, sondern entsendet ihre Bediensteten in den für unsere Angestellten bestimmten Kurs.

Der Präsident: Ustrnul m. p.

La kurso komencis la 1-an de dec.

Steiner.

La ŝtataj ekzamenoj

8.—10. XI. 1926.

La temoj de la skribaj ekzamenoj estis jenaj: 1. Por instrukapableco: Traduko: Fund. Krestomacio V. „Rimarkinda horloĝo". (La teksto estis diktata.) Stila tasko (laŭ elekto): La juneco de Zamenhof kaj la preparaj laboroj por E. — Kiel oni povus plirapidigi la E.-movadon? — Vizito al tombejo. Pedagogio kaj lingvometodiko: Influoj de la grandurbo al la junulareduko. — Esenco kaj avantaĝoj de la indukta analita rekta metodo en la lingvoinstruado. 2. Ekzameno pri scipovo: Traduko: Fund. Krestomatio V. „El la poŝto" (la unuaj 35 linioj). Stila tasko (laŭ elekto): Ĝojoj aŭtunaj. — La ekzistmalfacilaĵoj de nia tempo. — E. kiel lingvo por literaturo.

D-ro Fr. Wollmann, dir. de la kom.

Aŭstria Esperanto-Instituto:

Jarfina raporto pri la lasta fazo de la preparaj laboroj.

En la fonda komitato i. a.: 4 akademiaj instruistoj (prof., doc., lekt.), 2 mezlernejaj, 3 aliaj akademianoj, 1 urba konsilano, 1 reprez. de la komercistaro, 1 de la fervojoj.

La prezidantaron konsistigas ili kun 15 aliaj alvokitaj eminentuloj el la ĉefaj urboj aŭstriaj.

En la direktantaro estas i. a.: 1 altlerneja profesoro, 1 mezl., 1 juristo, 1 instruisto, 1 oficistino.

Statuto preparita.

Koresp. membroj: Sen invito sin anoncis jam multaj pers. diverslokaj, inter ili alilandanoj. Korespondado (ĝis nun kun 55 landoj) jam efikis kontentigan rezulton por E. en tre grava afero. (Raporto pri tio sekvos post finiĝo.)

Fakoj (estrataj de fakuloj): Ĝis nun funkcias 4 (de 8), neoficiale preparante sian agadkampon.

Ĝisnuna havo de A. E. I. valoras proksme. 800 ŝ. aŭ.

Biblioteko (enh. nur valorajn kaj multajn ne plu haveblajn verkojn): 417 ekz., disponigeblaj post pr. du monatoj.

Scienca laborado: E.-resumoj al du specialverkoj de eksterl. sciencisto baldaŭ aperontaj; efektivig. helpe de samfakuloj.

Kursoj en la unua duono de l' nuna studjaro ne estis aranĝataj, por ne malutili subite kelkajn E.-societojn en Wien. Komenco antaŭvideble per specialaj.

Invitoj al kunlaboro: Eliros tuj post la preso de la statuto kaj fino de ankoraŭ necesaj internaj laboroj. Tamen sinanonco (precipe de izoluloj) jam nun akceptata. Kotizo ne ekzistas.

Por A. E. I.: kom. Smital.

Graz. Laŭ invito de E.-Soc. por Stirio la 16. okt. s-ano Smital-Wien sukcese parolis pri „Int. Radio-Lingvo". Dum sia dutaga porpropaganda restado en G. li vizitis la landan lernejinspektoron Mörtl kaj ĝen. sekr. de „Fremdultrafika Ligo por St.", J. Rückl, kiuj ambaŭ certigis lin pri sia favoro kaj subtenemo al Esperanto. Centra insp. de la polico M. Görger-St. Jörgen dekláris al s-ro Smital sian pretecon, klopodi por enkonduko de E. kiel deviga instrufako en la polica lernejo. Plue s-ro Sm. paroladis en la blindula instituto kaj en komerclernejo Horneck, kiu tuj envicigis E.-on en sian instruprogramon. — En la realgimnazio prof. Hainschegg gvidas fakultativan instruadon de E. al 22 lernantoj de 7-a kaj 8-a klasoj. — La plej grava ĵurnalo „Tagespost" (antaŭe plej indiferenta!) depost kelkaj monatoj raportas regule pri „Progresoj de E.". — La 28-an okt. okazis la jarkunveno de Loka Gr.-Graz de E.-Soc. por St. La jara raporto notis krom laboroj por la bonegsukcesa VI-a la aranĝon de 9 kursoj kaj fondon de soc. grupo. L. Gr. de E.-S. por St. havas nun 123 anojn; estro: R. Hallamayer; sekr.: H. Conti; kas.: K. Lossos. (Rap.: Mader.) — „Emanuel Peltier", novfondita katolika grupo, kiu aliĝis al A. K. L. E. Prez. d-ro Halbedl, sekr. s-ro Gartler. — „Kleriga unuiĝo de la fervojistoj" instalis E.-kurson, 46 partopr., gvid. Jos Schwarz.

Korneuburg: La urba konsilantaro decidis en sia kunsido, pagi la kostojn de la E.-kurso en la burĝlernejoj. Distrikta lernejinsp. Reg.-Rat Schatzl inspektis la E.-kurson en la burĝlernejoj la 6. dec.

Krems: La grupo entreprenis la 21. nov. ekskurson al Spitz kaj vizitis tie s-anon Jedek, kiu posedas tie hotelon „Jedek".

St. Margarethen ap. Lebring (Stirio). Parol. en lernejo kaj kurso (15 p., inter ili la direktoro): M. Kotačka.

Voitsberg (Stirio). Kurso de lern.-kons. dir. Fr. Schöpfer (7 p.).

Wien: Wien-a Akademia Soc. Esp.: La 29. nov. ĝen. kunveno. Prez. Illing. vicprez. Lempert, sekr. Postl. Kurson p. komenc. ĉe la universitato gvidas d-ro Pfeffer. — Aŭstria Katol. Ligo E.: La 19. dec. okazos Zamenhoffesto je la 16a en paroladsalonego de „Kathol. Volksbund", 8. Piaristengasse 43. Ĉiuj kore invitataj. — Unua Esperanto Unuiĝo aranĝis la 19. nov. funebran vesperon por honori la memoron de siaj ĉi-jare mortintaj anoj. Ĉeestis la familianoj kaj ĉ. 80 samideanoj. Post salutvortoj de l' prezidanto s-ro Sinner deklamis magistro Taussig la poemon de Zamenhof „Ho mia kor'!" Poste f-ino Subert parolis pri Ernestino Krämer, inĝ. Sinek pri Hugo Steinhauer kaj d-ro Sós pri Ferdinando Hartwich. La tri parolintoj menciis per varmaj vortoj la meritojn al Esperanto de la por eterne eksiĝintaj membroj. La solena kunveno finiĝis per deklamo de tre impresa poemo de kolonelo Zwach, de li mem verkita por ĉi tiu okazo. — Aŭstria Pacifista E.-Societo: Konvers. kurso en ĝia ejo III., Henslerstrasse 3, por progr. IV., Schäfferg. 3. — „Konkordo": Fondo de nova filio la 6. dec. en XVIII., Kreuzg. 2. Filiestro s-ro Leopold Jeczek.

Wiener-Neustadt: La laborista grupo tie tre vigle laboras. 600 flugfolioj, 25 plakatoj, 14 taga ekspozicio en la montraj fenestroj de la popola librejo „Gutenberg" atentigis la publikon pri E. La sukceso: 120 novaj kursanoj. — Neŭtrala grupo mankas; nur kelkaj izoluloj.

Esperanto-Gottesdienst in der Minoritenkirche.

19. Dezember 1926, 10 Uhr, mit Predigt.

Rimarkindaj Presaĵoj.

El la eldonejoj:

Tagblatt-Bibliothek-Wien:

Wörterbuch Deutsch-Esperanto von Dr. Emil Pfeffer. Nr. 385/388. Preis S 1.60. — Dieses Wörterbuch ist berufen, dem angehenden Esperantisten als Wegweiser zur Sprachvervollkommnung zu dienen. Keine Verlegenheitsentlehnungen. Als Material zu diesem Werke diente kein französisches und lateinisches Wörterbuch, sondern das pulsierende Esperantoleben. Es ist das E. der Weltkongresse. Jenes klassische E., von dem wir so stolz sein können, zu behaupten, daß wir beim E.-Kongreß nicht zu erkennen vermögen, ob gerade ein Europäer oder Amerikaner, Orientale oder Südafrikaner spricht, ob der Redner alle europäischen Sprachen beherrscht oder nur sein Finnländisch und Esperanto.

Was ist also in diesem Buche das Neue? Unser altes, allen vertrautes, einfaches und klares Esperanto. Man wollte einst mit neuen Wörtern das Esperanto bereichern. Solche Fremdwörter fanden hier keine Aufnahme oder aber sie wurden vollständigkeitshalber angeführt. In dieser Beziehung ist dieses Buch als Esperantoratgeber am lehrreichsten, ein Anreger zum richtigen Esperantogebrauch.

Dr. Zoll-Wien.

Ellersiek & Borel-Berlin:

„El Komedioj." Fragmentoj el La Revizoro de Gogol kaj el Georgo Dandin de Molière. Esperantigitaj de Dro. L. L. Zamenhof. 2a eldono. E. B. I. nro. 8. Prezo —·70 RM. — El ambaŭ komedioj apartenantaj al la klasikaj verkoj ne nur de la mondliteraturo, sed ankaŭ de l' esperantlingva, estas elektitaj kelkaj scenoj plej bone montrantaj la stilon, tendencon kaj valoron de la verkoj. Speciale modela restos por ĉiuj verkantoj kaj tradukantoj, kiel nia majstro imitis en la „Revizoro" la dialekton de la nekleraj homoj. La nova eldono estas zorge korektita kaj sen preseraroj kaj por ĉiu E-isto ne nur interesa pro la enhavo, sed ankaŭ valora instruilo pro la bona kaj simpla — de multaj E-verkistoj jam forgesita — stilo. Gvidantoj de perfektigaj kursoj nepre uzu ĉi tiun libreton. J. Mader-Graz.

La amkonkurantoj, triakta komedio originale verkita de Reinhold Schmidt, E. Bibl. Int. n-ro 32, dua eldono, 40 Rm.

Sereniga libreto por gajemuloj. Grava afero ne estas la kerno: Filino de honesta familio amas junan aktoron. Ŝia patrino preferas kiel svatonton riĉan fabrikanton. Fine venkas la sincera amo helpe de patra subteno en komika maniero. — Kio valorigas la verketon, estas la flua stilo de la konversacio. La frazoj estas simplaj, korektaj kaj tial la legado rekomendinda precipe al komencantoj, kiuj en agrabla maniero povas el ĝi lerni multon por la ĉiutaga lingvo. — Kelkajn erarojn oni povus korekti en sekvonta eldono; ekz. dancis(n)tino (pĝ. 11), alt(rang)a vizito (13), poet(m)a figuro (14), ekvido (ekrigardo) (22), terenvidante (rigardante teren) (23) k. s. bagatelaĵoj. — Por malgrandaj amuziĝemaj grupoj ĝi ŝajnas esti taŭga por prezentado. Smital-Wien.

Heroldo de Esperanto-Horrem:

Verda Stelo, monata organo intern., estas eld. la unuan fojon en okt. nj.

La lastaj tagoj de dr-o L. L. Zamenhof kaj la funebra ceremonio. Eldonis Adolfo Oberrotmann kaj Teo Jung. Eld. 1921. Bela monumento, starigita de la tutmonda esperantistaro ornamas la tombon de nia kara majstro. Miloj pilgrimos al ĝi. Sed aliaj miloj, ne povantaj tion fari, aĉetu kaj legu ĉi tiun libreton. Ĝi estas efektive ankaŭ spirita monumento de la geniulo. Bonega portreto de Zamenhof kaj dek scenbildoj de lia enterigo, historio de liaj lastaj suferoj, vervaj epilogoj kaj elegioj de Belmont, Baghy, Grabowski kaj Hiller estas la valora enhavo de la broŝuro. Ĉiu samideano devas ĝin posedi. Sós.

Hirt & Sohn-Leipzig:

Der Verlag versendet auf Wunsch eine Broschüre, enthaltend Urteile über die bei demselben verlegten 5 Wörterbücher: Bennemann, Hirt und Wüster (3).

Deklaracio de T. Ariŝima, el la japana originalo tradukis kun permeso de la aŭtoro T. Tooguu. Int.-Mond-Lit., vol. 11—12; 1924; 125 pĝ.

„Reciproka sinnekonado". Tiu vorto de l' majstro ekviviĝas en la memoro de ekleginto. Surprizo ekregos vin ĉiam pli granda de paĝo al paĝo. La nervovipitecon de okcidentulo vi ja devos antaŭe demeti, ĝuonte la verkon; sed tiam ĝi permesos al vi profundan rigardon en la animvivon de kvar nipponaj gejunuloj. Pri kio la teksto temas? Ekstera okazado tute mankas. Nur mallonge antaŭ la kulminacio fraŭlino J. vojaĝas de Tokio al Sendai, kie restadas ŝia fianĉo, kaj ambaŭ sidas kune tutan nokton — preskaŭ senvorte. Ŝi ne parolas al li, sed transdonas la klarigon, ke ŝi devos edziniĝi kun li kun malplena koro, ĉar ŝi amas lian amikon, — skribe. Respondo: „Mi vin bone komprenis. Miaflanke mi havas nenion por diri." Sekvas la „deklaracio" de la amiko kaj la akceptrespondo. Sed!! Temas pri pasiegaj naturoj, kiuj komunikas unu al la alia la simplan, akre dolorigan veron pri siaj internaj evolufazoj. La aŭtoro ŝajnas esti pentristo, kiu havas sur sia paletro ĉiujn varmeconuancojn, per kiuj li pentras sur via dorso, — se vi estas homo kun kor' en la brusto. La tuta sentskalo, kiun ampleksas la du silaboj a-mo, respegulita el la por ni strangaj eksteraj kondutmanieroj orientulaj kaj tamen tiom komprenebla, skuperfortanta ankaŭ por ni — jen la enhavo.

Senrezervan laŭdon al la delikate reproduktpova tradukinto! La eldonejo meritas profundan dankon pro la diskonigo de tiu ege interesa, etike, etnografie kaj filozofie valora verko el ne tre konata literaturo. Danku aktive per aĉetado, ĉar de la gusto pruvita de l' publiko dependas la eldonaĵoj!

Legendoj, A. Niemojewski; kun permeso de la aŭtoro el la pola originalo trad. Bronislaw Kuhl; kun antaŭparolo de A. Grabowski; 2a eld.; 1923; 74 pĝ.; prezo: —

Homoj, kiuj pro ĉiam urĝantaj aferoj de l' tago ne trovas tempon por legi legendojn, eble ĝin trovos en la tagoj kristnaskaj. Despli, ĉar jenaj „legendoj" estas interesaj krom belaj! Se volas vi preni almane edifan libron en tiu tempo, elektu ĉi tiun. Interesa ĝi estas, ĉar la aŭtoro kunigas en si la majstran stilon de sukcesa beletristikulo nuntempa kun sciencista spertaro vojaĝa pri Eŭropo, Egipto, Palestino, Sirio ktp., scienca ekkono pri religioj rezultinta el kompara esplorado kaj — — jen, la kerna kaŭzo de la forta efiko! — ne nur scion psikologian, sed koron kunevibreman. Kaj ĝi vibregas kun liaj figuroj, kiuj el la paĝoj de la libro viviĝas. La temo ne estas nekonata: Temas pri Kristo aperinta inter la juda popolo mozeana. Sed la konsidermaniero estas tiu de moderna psikologo. La impreso apenaŭ imagebla pli forta. La kunpuŝiĝon inter du mondperceptoj, ankoraŭ nuntempe aktualan, oni nur malfacile povus pli trafe ilustri kaj pli emociige, ol tion faris Niemojewski, la liberpensulo.

La bonega volumo de Int. Mond-Lit. ornamu la donacotablon de viaj amikoj. Ĝi estas nur malmultekosta. Walter Smital-Wien.

Rud. Mosse-Berlin:

Charles Baudouin. La Arto de Memdisciplino: Psikagogio, Bibl. Tutm., n-roj 5—6, 96 pĝ.

Tiu ĉi libreto enhavas la du prelegojn, kiujn la aŭtoro faris ĉe la Somera Universitato Esperanta en Ĝenevo 1925. En scienca, sed bone komprenebla maniero li detale pritraktas la vere nefacilan temon, apogante sin sur la jam sufiĉe granda bibliografio. Post antaŭparolo kaj enkonduka ĉapitro sekvas du partoj, kiuj enhavas detalojn pri „etikaj teknikoj" kaj pri „psikoterapioj", konkludo kaj tri aldonoj (internaciaj organizaĵoj, bibliografiaj notoj, teknika terminaro) finplenigas la interesan libreton, kiu pro la enhavo precipe al filozofoj, pedagogoj kaj kuracistoj, pro la bonega stilo al ĉiuj Esperantistoj estas sincere rekomendata. Schamanek-Tullnerbach.

Aliaj:

Studvojaĝo en Sovetrusio. Sur 36 pĝ. kun belaj ilustr. la „Sveda ŝtatoficista delegacio" raportas pri sia studvojaĝo, kiun ĝi entreprenis je invito de la „Ruslanda Unuiĝo de Ligilo" en aprilo 1925. Tre interesa broŝureto, kiun Einar Adamson tradukis. Prezo ne montrita. Ricevebla de Sveda Laborista Esp. Asocio, Göteborg I.

Poŝtkarto „La Kristo de la Andoj" kun bildo de tiu kolosa statuo fandita el la kanonoj de du nacioj repacigitaj de siaj episkopoj. Interesa teksto. Eld. „Katolika Mondo". Prez.: 50 pecoj 3 sv. fr. — Poŝta ĉekn-ro Wien 162.473.

Gvidlibreto ilustr. tra La Panne, Coxyde kaj Oostduinkerke eldonita okaze de la XVa Kongreso de Belga Ligo Esp. (23. 24. V. 1926.)

Hinda Esperantisto, org. de la tuthinda esp.-aro, red. Liem Tjong Hie, Kranggan 19/23, Semarang, Java. Nova gaz. en E. kaj hinda lingvoj.

„Kondukanto al belega Skotlando" kun aldono aparta (33 belaj bildoj) aperis nun en kvara eldono ĉe Higgie & Ko., Rothesay, Skotlando. Prezo ang. Ŝ 1/4.

„Juna Azio", Motozono, Kojimachi, Tokio, Japan nova gazeto, aperis la unuan fojon en julio.

„The Irish Esperantist", organo de la Irlanda E.-Asocio, aperis la unuan fojon en julio, 12 pĝ. Prezo angla ŝ. 1·— pojare (4 n-roj.) Adreso: 5 Mount Eden Rd., Dublin.

Kie oni renkontas E.-istojn?

Graz.

Esp.-Verein für Steiermark, Geschäftsstelle (oficejo) Radetzkystr. 6/III, Vereinsheim (kunvenejo) „Pastete", Sporgasse 28, Do (ĵ) 20—23 h.

Innsbruck.

Arbeiter-Esp.-Klub (Laborista klubo), Südtiroler Platz, Hotel Sonne, Do (ĵ) 20—22 h.
Esperanto-Klub, Gasthof „Goldener Greif", bei der Triumphpforte, Mi (me) 20—22 h.

Wien.

Aŭstria Katolika Ligo Esperantista, I., Freyung 6 (Pfarrkanzlei), Mi (me) 17—19 h.
1. Wiener Esp.-Verein, I., Schellinggasse 7, Schellinghof, Fr. (v) 19·30 h.
Aŭstria Pacifista Esp.-Societo, III., Henslergasse 3, Hochparterre; Do (ĵ), 19—21 h.
Esp.-Verein der städt. Angestellten Wiens, IV., Schäffergasse 3, Di (m) 17—19 h.
„Konkordo", V., Margaretenplatz 4 (Terrassencafé), Do (ĵ) 19—22 h.
Esp.-societo „Danubio", VII., Neubaugasse 25, Café Elsahof, Mo (l) 19—23 h.
Wiener Akademischer Esperantisten-Verein, I., Universität. Zusammenkunft wie (kunvenejo la sama kiel) „Danubio".
Esperanto Bücherstelle d. Freien Esp. Arbeitsgemeinschaft, VII., Lerchenfelderstr. 23; Auskünfte (informoj) Täglich 18—19·30 h.
Esp.-Bildungsverein „Supren". VII., Kaiserstraße 121, Café, Fr (v) 18—21 h.
Esp.-Unio Fervojista. XIV., Avedikstr. 2, Di (m) 19 h.
Bohema Klubo Esperantista, XV., Turnerg. 9, I. et., Narodni dum, Mi (me) 20 h.
Esp.-societo „Fideleco", Währinger Bürgercafe, XVIII., Staudg. 1, Di (m) 16—19 h.
Esp.-soc. „Kulturo", XVIII., Kreuzgasse 34, Café Hildebrand, Di (m) 19·30 h.

Rekomendindaj firmoj.

E. signifas, ke oni parolas E.-on.

Graz.

Café = kafejo:
„Post", I. Haring, Neutorgasse.

Korneuburg.

Bäckerei = bakejo:
Karl Luegmayer (E), Albrechtstraße 3.

Wien.

Elektrotechniker = elektroteknikisto:
Herm. Heutler, (E), VIII., Pfeilg. 53, tel. 22096.
Pension = pensiono:
„Esperanto" (E), IV., Argentinierstr. 53, Mezz., tel. 52740.
Versicherung = asekuro:
F. Strubecker (E), III., Schützeng. 3, kunlab. ĉe asekurentrepr. „Janus", fond. 1824.
Zuckerwaren = sukeraĵisto:
Franz Prohaska, XII., Premlechnergasse 21.

Ciferenigmo.

De d-rino Brünhilde Flasch-Wien.

1. 15, 5, 14, 17, 7, 10, 7, 13.
2. 1, 2, 7, 16, 11, 13, 8.
3. 13, 12, 9, 10, 7, 12, 13.
4. 18, 10, 11, 13.
5. 1, 6, 13, 12, 7, 13.
6. 1, 19, 5, 12, 13.
7. 5, 17, 5, 15, 12, 5, 3, 13.
8. 13, 12, 4, 13, 15, 13, 11, 14, 7, 10, 13.

Signifoj de la vortoj:

1. alia nomo por rampibesto;
2. titolo de la nova originalromano de Jean Forge (eldon.: Hirt);
3. parencino;
4. arbo;
5. malsanstato;
6. dombesto;
7. senfina tempospaco;
8. instalaĵo ŝirmanta pontegojn.

Rezulto: La unuaj du literoj de ĉiu vorto legataj de supre malsupren rezultigas admonon al niaj amikoj.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Hugo Steiner, Bisamberg 248.
Presejo: Gesellschafts-Buchdruckerei Brüder Hollinek, Wien III, Steingasse 25.